



An organ of the Esperanto Association of Britain

Organo de Esperanto-Asocio de Britio

No. 30, July–September 2005 ★ N-ro 30, julio–septembro 2005

ISSN 1741-4679

**International Communication without Discrimination ★ Respect for All Cultures
Internacia Komunikado sen Diskriminacio ★ Respekto por Ĉiuj Kulturoj**

Bulonjo 2005 - celebration of the 1st World Esperanto Congress in 1905

Prior to 1905 many Esperantists still were not certain whether the language really functioned. Many hesitated whether to organise a large world demonstration. But what a brilliant success that congress was! And since 1905, Universala Esperanto-Asocio have held a World Congress (Universala Kongreso) every year – apart from the war years – somewhere across the globe. Although the world still ignores the event, preferring to bow to political and economic power relationships, we can be certain that the first Universala Kongreso de Esperanto will be recorded as a key event in the history of man's relationships with man.

Foto de Libera Folio

The world's first Esperanto congress took place in 1905 when 688 Esperantists from 20 countries travelled to Boulogne-sur-Mer and demonstrated that Esperanto, hitherto only used for correspondence and at small gatherings, was also a successful international language for large, multinational meetings.

To celebrate the centenary of that historic event, 550 Esperantists from 22 countries visited Boulogne again. (The numbers had to be restricted, because of safety considerations at the venues. The 90th World Esperanto Congress takes place in Vilnius later this year, having already attracted nearly 2,000 participants.)

On 26 March 2005, Esperantists gathered in the same theatre where the original event had taken place to hear greetings by local dignitaries, including Boulogne's Mayor, Frédéric Cuvillier, and the Polish Ambassador to France, Maria Wodzyńska, and speeches by prominent Esperantists, reflecting on Esperanto's role in the next 100 years. Zamenhof's original 1905 speech was brilliantly declaimed by Arno Lagrange. His famous words are

equally relevant 100 years on:

*... la unuan
fojon en la homa
historio ni, membroj
de la plej malsamaj
popoloj, staras unu
apud alia ne kiel
fremduloj, ne kiel
konkurantoj, sed
kiel fratoj, kiuj, ne
altrudante unu al
alia sian lingvon,
komprenas sin
reciproke, ne suspektas unu alian
pro mallumo ilin dividanta, amas
sin reciproke kaj premas al si
reciproke la manojn ne hipokrite,
kiel alinaciano al alinaciano, sed
sincere, kiel homo al homo. Ni
konsciu bone la tutan gravecon
de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ
inter la gastamaj muroj de
Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne
francoj kun angloj, ne rusoj kun
poloj, sed homoj kun homoj.*

The event in the theatre was followed by a procession through the town to the square named after Zamenhof. Flowers were laid at the memorial. The procession ended with a reception at the town hall, where the Mayor entertained to a champagne buffet.



*Participants in the original
theatre in Boulogne where
Zamenhof spoke in 1905*

Excursions and Workshop

The five-day event of 2005 included several excursions within the town and around the local countryside, lectures and cultural events. A workshop session produced a resolution on strategy and promotion of Esperanto, which the local town council agreed to discuss and record in the minutes of their council meeting on 29 March.

French local media

There were plenty of banners and flags in Boulogne mentioning 'Esperanto'. Many were mounted

by the local council as part of the town's 'official' decorations. Several half- and full-page articles about the event appeared in the local press, and a 10-minute item was broadcast on the regional television channel.

In Zamenhof's footsteps

The 1905 congress included a visit across the Channel. The 2005 festivities re-created this, but took advantage of the Channel Tunnel.

Terry Page and his team did a great job of organisation, even though

unforeseen circumstances conspired against the excursion. The scheduled train was cancelled, so the five coaches arrived an hour late. Terry had to inform those waiting on this side of the Channel, but the Mayor delayed her arrival and welcome, the latter delivered partly in Esperanto. John Wells interpreted and responded.

Meals at the two restaurants (necessary due to the large number of participants – 230 at least) had to be quickly rescheduled, which gave Terry and others a headache. They were highly resourceful, and time was

made up during the afternoon.

Mayor rebukes press

There was no sign of journalists, and the Mayor was annoyed at their non-appearance. After the welcome ceremony she phoned the local paper and told them off. Result: they turned up for the evening arrangement and interviewed her, Gordon Hawker and others, and took photos. The



La kongresanaro de 1905 – meze antaŭe sidas Zamenhof

evening consisted of two sittings with snacks and a glass of wine. John Wells gave a 10-minute talk, well received (both times). The East Kent Morris Men gave their performance, although it had to be cut to 15 minutes to allow the coaches to depart in time to catch their train back.

The Mayor also came to the evening event, and she joined in to wave goodbye to the coaches as they departed.

Fog in Channel!

The weather was awful – thick chilling fog – so you could hardly
(Continued on page 7)

Ferisezone

Ĉi tiu numero havas kongresan ĝuston. Ĉefrolas tri renkontiĝoj: Bulonjo 2005, la Jarkunveno de EAB en Londono kaj la jubilea Skota Kongreso en Largs – kaj ni staras sur la sojlo de kvara, nia plej granda monda manifestacio, la Universala Kongreso, ĉi-jare okazonta en Litovio.

La nuna sezono tradicie estas la tempo eliri en la mondon kaj praktiki la lingvon. Bedaŭrinde ne ĉiuj povas fari tion pro diversaj kialoj, sed rimarkeblas, ke ni ne vidas ĉe niaj naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj certajn homojn, kiuj tamen iel aktivis sur lokaj niveloj. Eble ni devus primediti la aferon.

Povas esti, ke ili preferas sidi hejme kaj foliumi en libro – kaj, kompreneble, ĉiu laŭ sia gusto. Sed ĉu eventuale kuŝas aliaj kialoj malantaŭ tio? Ĉiu nivelo de nia agado gravas, kaj ĉiu nivelo provizas per io alispeca, sed finfine la internacia nivelo estas nia ekzistokialo. Do ni ĉiuj provu kuraĝigi niajn gekonatojn partopreni internacie – tie, kie Esperanto vivadas en sia natura ĉirkaŭaĵo.

Geoffrey Sutton

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 1 September.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Ĝisdate* atingu la redaktoron plej laste la 1-an de septembro.

EAB-Update / Ĝisdate is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141

Fax / fakse: +44 (0)1782 372229

E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

Websites / ttt-paĝoj: www.esperanto-gb.org

www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter £10 / Membriĝi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto pagas £10.

☆

□ Material for *Update* should be sent by e-mail, computer disk or hard copy to the editor / Materialon por *Ĝisdate* oni sendu rete, diske aŭ papere al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@macunlimited.net. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto, and the English-language internet bulletin *EAB NetNews* / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto, kaj interrete la anglalingvan bultenon *EAB NetNews*.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco.

☆

□ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB aliĝis ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).


☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne repre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

Points from the AGM in London



Before the AGM, Professor John Wells delivered a lecture on the work of the Esperanto Academy. Above: Members in discussion after the formal meeting



There were 66 postal ballots, 1 spoiled ballot, and 20 votes cast at the AGM.

Charity Bill

Joyce reported that the Charity Bill had fallen due to the calling of the general election, and she outlined possible advantages for small charities when the bill is passed. Edmund Grimley Evans read out information received from the Charity Commission, stating that members have no financial liability. Ian Fantom commented that it is not the Charity Commission who know about liabilities of charities.

David Bisset enquired what percentage of members had signed a Gift Aid form, to which Joyce Bunting replied that she did not have the figure at hand but believed around 60 people had signed such a form.

The 28th Annual General Meeting of EAB was held on 7 May at the Central Baptist Church, Bloomsbury, London.

Twenty-six members attended, including the trustees.

John Wells opened the meeting by welcoming the members. He later read out a list of members who had died during the previous 12 months and asked for a minute's silence in their memory.

The Honorary Treasurer, Joyce Bunting, presented a summary of the Trustees' Report as well as the Financial Report, on which there were no comments. The Trustees' Report was approved unanimously.

The meeting decided that membership rates should remain unchanged.

Election

For the election of members of the Management Committee (trustees), Arthur Sly and Arthur Prent were proposed as vote-counters and were accepted unanimously. The result of the ballots cast at the meeting and the postal votes were as follows:

CANDIDATE	FOR	ABSTAIN	AGAINST
David Bisset	76	5	4
Joyce Bunting	80	4	1
Helen Fantom	60	17	8
Ian Fantom	47	17	21
Edmund Grimley Evans	72	12	1
David Kelso	79	5	1
Geoffrey Sutton	74	10	1
Derek Tatton	76	8	1
John Wells (president)	80	4	1

John Wells declared that all candidates had been duly elected.

Bulonjo 2005

Terry Page presented a detailed



Arthur Sly and Arthur Prent diligently counting the votes

report (see pp. 1, 2 & 16). David Kelso proposed a vote of thanks to Terry for his sterling work in the organisation of the British part of the event, which was warmly applauded. He also presented Terry with a bottle of Glen Terence Scotch whisky as a token of his personal thanks. John Wells thanked Terry and Anica Page on behalf of EAB.

Membership comments

There was a general discussion on obituaries, Terry Page querying how one might obtain information on deaths. David Kelso suggested that *EAB Update* might print a notice requesting information on members who had passed away. John Wells said one could put one's own autobiography on the web.

The discussion moved on to publicity. Helen Fantom commented that it is important that one does at least something; if in doubt she could suggest something. Terry Page asked if we are recruiting enough young members. There was agreement that we are not. John Wells remembered Humphrey Tonkin's small, informal JEB meetings. It was commented that young people meet more often on the web nowadays. Ian Fantom reported

that he gets around a thousand hits on his Esperanto Viva website a year but does not know how many are from the UK. He said we needed a fresh approach but gave no details.

Terry said he recently presented Esperanto at two schools, adding that we should not expect immediate positive reaction – an 'incubation period' is normal. Helen recalled similar experiences with Norman William's' initiatives in Manchester, adding that we might exploit the still great interest in language learning. Ian Fantom believed there was divided opinion in the Administrative Committee on the Esperanto Lobby, to which John Wells replied that he was referring to 'old issues' of many years ago and that there had been no such discussion in recent years.

Bill Walker referred to Angela Tellier's work for schools, to which Helen replied that it concerns in particular primary schools. In response to further queries, she went on to outline the present work in Gloucestershire, reporting that primary schools will have to teach a foreign language for four years and, as most teachers do not speak a foreign language already, Esperanto offers them a uniquely

advantageous path forward, introducing them to language learning in general and useful aspects of other subjects, such as grammar and mathematics.

Administrative Committee meeting

After the AGM, the new Administrative Committee held a brief formal meeting. Due to lack of time, the responsibilities of individual members of the Administrative Committee will be dealt with at the Committee's annual discussion weekend meeting in Barlaston in July. There are, however, proposals that David Kelso deal with 'outside education' issues and that Ian Fantom deal with research.

It has already been decided that there will be discussions in Barlaston with Jill Ward, Principal of Wedgwood Memorial College, and Terry Page. Jim Voiels and Angela Tellier will also attend all or part of the weekend to discuss their respective fields of congresses, local PR and education.

Contacts with Liverpool University continue, although it is proving difficult to obtain concrete information. All relevant matters will nevertheless continue to be pursued by the Committee.

Books for Africa

A sum of £200 was approved to cover requests from Africa for books. Any such requests are first approved by the African Office of UEA.

EAB website

Special thanks were afforded by the Committee to Vilçjo Walker for promptly updating the EAB website, which for so long had languished without anyone willing to take it on.

The Committee is still looking for someone to take on the task of arranging lecture tours. Is there a volunteer for this out there?

Brilis la suno por la centa, jubilea Skota Esperanto-Kongreso

La 100-a Skota Esperanto-Kongreso, okazinta en Largs, estis brila sukceso en belega vetero kaj rava pejzaĝo. La aranĝon honoris la partopreno de la prezidantoj de EAB kaj UEA en ĉeesto de 65 aliĝintoj, inter kiuj ne sole eksterlandanoj el Anglio, sed ankaŭ el Germanio, Irlando, Italio kaj Nederlando.

Fotis Dominique Tellier

La programo estis plena kaj varia, kaj – kiel oni lernis atendi de skotoj – ankaŭ altnivela. Ĝi inkluzivis plurajn prelegojn de eminentuloj. Prof. John Wells, Prezidanto de EAB, parolis pri ‘La Rolo de la Akademio’, d-ro Renato Corsetti, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, parolis pri denaska



La kongresanoj kune bankedas en la sunĉambro de Priory House Hotel kun la prezidantoj de EAB kaj UEA, la vicurbestrino de Largs kaj rava elrigardo trans rivero Clyde al insulo Great Cumbrae, ĉirkaŭ kiu pluraj kongresanoj brave biciklis (supre).

akirado de Esperanto kaj cetere ĉefrolis en demandosio, gvidata de David Kelso.

The projected date of publication for the **EAB Handbook** is the coming autumn.

The Committee agreed a budget for a one-day **Seminar for Future Teachers** to take place during the Summer Festival (formerly Summer School) in Barlaston, with a maximum of eight participants.

Terry Page had presented detailed written reports on *Bulonjo 2005*. There will not be a deficit. The Secretary has thanked Terry on behalf of the whole Committee and members.

Unfortunately, the **next British Esperanto Congress** will not be taking place in Whitby as announced due to various problems. Another venue is still being

sought in the region.

EAB will be represented in the Committee of UEA in Vilnius by Helen Fantom, who will also arrange greetings from EAB to world Esperantists in the Opening Ceremony.

The Committee is attempting to arrange a republication of John Wells' *Teach Yourself Esperanto and English Dictionary*. However, this is unlikely to be possible for a number of years.

It was reported that the 100th **World Scout Jamboree** will take place in Gillwell, Essex, in August 2007. The Committee is researching ways of using this opportunity for disseminating information. Anyone with Scout experience, please contact the office. □

Skota Skolo

Ĉeftemo de la kongreso estis la Skota Skolo de la Esperanta literaturo. Ed Robertson prelegis pri Albert Goodheir, Marjorie Boulton pri John Dinwoodie. Hugh Reid enkondukis pri John Francis, kiu mem rakontis ‘anekdotojn’ pri siaj spertoj kun kolegoj en la Skota Skolo. Paul Gubbins prelegis pri Reto Rossetti, kaj Stephen Thompson gvidis deklamadon kaj kantadon honore al William Auld.

Alia prelego, kiu ricevis apartan atenton kaj aplaŭdon, estis tiu de David Lilley – unuafoje prelegante en Esperanto – pri D.B. Gregor. Oni memoras lin kiel gramatikiston, esperantologon, sed li rolis sur ne-kredeble multaj lingvaj scenejoj, verkante i.a. la libron *Celtic*.

Fotis Dominique Tellier

Ni kun intereso atendas la promesitan biografion.

Ankaŭ aktiva

Komprenoble, la partoprenantoj ankaŭ sin amuzis per muziko kaj ekskursoj. Grupo marŝis supren laŭ apuda monteto, aliaj rigardis la urbeton Largs. Ĉar tie okazis la Batalo de Largs en 1263, kiam finiĝis skandinava rego super okcidenta Skotlando, grupo vizitis la ekspozicion Vikingar, kaj poste okazis prelego pri la



Supre: Duncan Thomson gvidas grupon da marŝemuloj supren.

Maldekstre: La antaŭkorto de la hotelo-kongresejo kun elstara pejzaĝo trans la rivero insulen kaj monten.



Fotis Andreas Kieck

skandinavaj lingvoj.

Notinda estis la veturo per pramŝipo al la insulo Great Cumbrae, kie oni pasigis la dimanĉajn programerojn. La plej bravaj kongresanoj ĉirkaŭpedalis la tutan insulon (naŭ mejlojn). Kiu asertu, ke ni maljuniĝas? Sed

Prezidanto de EAB, kiu ĉirkaŭbiciklis duan fojon!

Dum tiu tago gastis nin la Katedralo de la Insuloj en Millport, kie oni daŭrigis la programon interalie per ekumena diservo, samtempe kun kunveno de Bill Simcock pri bibliaj citaĵoj,

eĉ tio ne sufiĉis al la

kiuj kontraŭdiras asertojn de iuj religiuloj. David Bisset montris la arkitekturon de la Katedralo, kaj Duncan Thomson montris kiel fari nodojn.

Inter la multaj flagoj, kiuj flirtis en Largs, oni bedaŭretas, ke ne flirtis ankaŭ la Esperanta por vekti iom da scivolemo, sed estas tute certe, ke ĉiuj ege ĝuis la semajnfinojn en Largs. □

INFORMADO

Malferma Tago ĉe WMC

La 18-an de junio okazis Malferma Tago ĉe Wedgwood Memorial College en Barlastono. Jill Ward, la estrino de la kolegio, invitis al EAB partopreni – kaj venis multaj homoj, inkluzive de infanoj.

Ni multe lernis por ankoraŭ pli sukcesa informado en venontaj jaroj. Ekzemple, antaŭ ol komenci, ni ne sciis, ke oni uzos la kampon malantaŭ Esperanto-Domo kiel parkejon. Tio signifis, ke malgraŭ la fakto, ke plejparte ĉiuj budoj kaj agadoj

situis ĉe The Limes, multaj homoj tamen preterpasis nin survoje el la aŭto al la alia domo.

Kiam ili konsciis, Viv O'Dunne kaj Paul Gubbins pli aktivis kaj, anstataŭ atendi ĝis homoj venis, ili alparolis homojn ekster la centro, disdonante informilojn kaj babilante kun ili pri Esperanto. Tiel oni atingis pli da homoj. Venontan fojon ni bezonos ŝildon ekster la domo kun invito: 'Esperanto Open House ... find out about the international language here' ...

aŭ ion similan.

Derek Tatton ricevis multajn vizitantojn ĉe la ĉefa budo en ĉambro. Nur du infanoj partoprenis la 'gustumadon' – lecionojn de Paul, sed pro la lecionoj videblis ŝildetoj ĉie pri Esperanto, kaj tiel ni fone informis, ke Esperanto vivas.

Do la ĉefa afero restas: pli da aktivado ekster kaj ĉirkaŭ la Esperanto-Domo, eventuale ankaŭ tablo ekster la ĉefa enirejo, tiel ke ni povos vendi kraĵonojn kaj insignojn ... denove por montri, ke la centro tiel funkcias.

Do ... sukcesa tago, sed la venontan fojon eĉ pli sukcesa! □

Bulonjo 2005*(Continued from page 2)*

see across the street, and there was no sight or sound of the sea below the cliffs. It was just as bad at Dover Castle. There had been some amusement earlier about the old newspaper poster that stated 'Dense Fog in Channel – Continent Isolated'. Perhaps the fog was symbolic of the continuing fog in international communication!

Had the weather had been more spring-like the location would have been extremely attractive, and walking out of doors a pleasant diversion. Despite the disappointing weather, everyone went off with a good feeling, as far as we could judge.

On the ball!

Paul Gubbins and Jim Voiels had produced two news releases for this event: an advance release distributed in December 2004 and a later one timed to arrive about ten days before the excursion.

The releases were sent to seventeen national and local media addresses. It is possible that the event may have been previewed in this media, however without the services of press cutting and broadcasting monitor agencies this is difficult to establish.

Paul and Jim were very appreciative of Terry and Gordon's help in providing a lot of advance information for the releases, with good co-operation throughout.

Postscript

After the event, the *Kentish Express* responded to our news release and rang Terry urgently on Monday morning requesting information and pictures of the event. He circulated several participants, and within 24 hours presented excellent pictures of John Wells with the Mayor of Folkestone and a lively Morris Dance to the newspaper. The appeared on Thursday, 7 April, *Participants brave the murk at Dover*



At the Grand Hotel, the visitors were greeted (left to right) by the President of the Esperanto Association of Britain, Prof. John Wells; President of Belga Esperanto-Federacio, Flory Witdoeck; the Mayor of Folkestone, Mrs Ann Berry, and her husband.

under the title 'Multilingual: Global auxiliary language draws hundreds of celebrants | Esperanto fills the air at language gathering', together with a 'factfile' on Esperanto. On the same day there was also a piece in the *Kent Herald* (Folkestone, Hythe, Romney Marsh) and a letter by Frances Randall in the *Folkestone Herald*.

In France, the regional paper *La Voix du Nord* devoted a page to the celebrations, in which,

among others, Bill Simcock was interviewed with photo.

Thanks!

It is estimated that around 28 British Esperantists in total were in attendance – one came from Scotland especially. There was some criticism that so few British Esperantists attended. This was, however, mainly due to the necessity of limiting numbers in Boulogne.

Many thanks to Terry and Anica Page and Gordon Hawker, 'the man-on-the-spot', and all others who helped. Terry is to be warmly congratulated on having organised things very thoroughly and on coping with the unexpected difficulties competently. Terry and Anica worked for months to plan the excursion, they were 'on duty' throughout the congress in Boulogne dealing with bookings and queries, and they then had to reschedule the excursion's timetable 'on the fly' to accommodate the delays caused by the transport difficulties.

(Compiled from reports by Bill Walker, Joyce Bunting, John Wells, Jim Voiels and Terry Page.)



Participants brave the murk at Dover

Leĝpropono pri Esperanto en la itala parlamento

La kampanjo de Eŭropa Esperanto-Unio, konata ankaŭ kiel ‘hungaraj rajtoj-eŭropaj rajtoj’, celas doni al ĉiuj civitanoj de EU-landoj la rajton, kiun havas hungaraj civitanoj, nome lerni Esperanton kaj esti ekzamenata pri Esperanto fine de la mezgrada lernado. Ĝi celas kaj gvidlinion de la Eŭropa Parlamento kaj leĝojn en la unuopaj landoj de EU.

Efektive nuntempe oni malpermesas al la junularo de EU formale lerni Esperanton en la lernejo, dum la gnomoj de la edukaj ministerioj kaŝe elektis sen publika diskuto difinitan lingvon, kiu iĝas deviga ĉie.

Estas maldemokrate diri: neniu volas lerni Esperanton. La ekzemplo de Hungario, kie oni ja havas la elekton, montras, ke tamen multaj volas lerni ĝin.

En tiu kadro oni prezentis al la itala parlamento la 10-an de marto leĝproponon, kiu nun ricevis la numeron 5714 kaj aperis en la presitaj parlamentaj dokumentoj.

Ĝin prezentis la deputitoj Barbieri, Ranieli kaj Mereu, kaj ĝia tuta titolo estas: ‘Normoj pri la aliro al la studo kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto’.

La ĉefa artikolo estas la unua, kiu asertas, ke ‘Inter la elektoblajn fremdajn lingvojn en la ŝtataj devigaj lernejoj oni enkonduku Esperanton’.

Kompreneble nun devas okazi tuta premkampanjo al la italaj parlamentanoj por ke la propono estu efektive diskutata kaj aprobita.

Eble la Universala Kongreso en Florenco en 2006 kaj la ligitaj informlaboroj povos helpi. □

Are you a first time participant at the Universala Kongreso in Vilnius?

If you are a first-time participant at the World Congress in Vilnius and would like to meet up with others from Britain for some orientation, please contact the EAB office who will pass your details on to other individuals who are going. They may contact you without obligation.

Message board

And don't forget that participants can get in touch with one another by using the special congress message board.

Just put the congress number (see *Kongreslibro*) on a note and post it on the board – and don't forget to check whether someone else has left you a message under your number!

Sukceson en viaj internaciaj kontaktoj tra la mondo!

Probusaninoj vizitas Esperantujon!

Tre viglan, humoran kaj informan paroladon pri Esperanto donis Derek Fielding ĉe kunveno de virina grupo (Probus) en Ross-on-Wye la 12-an de majo.

Senronke atentis la tridek kvin emeritinoj malgraŭ la antaŭaj grumbloj aŭdeblaj, kiam ili eksciis pri la parolada temo. Derek tuj sukcesis kapti la intereson de la ne-tute-simpatima aŭdantaro, kaj lerte tenis ĝin senglite dum kvindek minutoj.

Enkonduke temis pri la koncepto de planlingvo; ĝiaj celoj,

kaj, kaze de Esperanto, ĝiaj avantaĝoj super naciaj lingvoj kiel tutmonda komunikilo. Ankaŭ la tiurilate nur ŝajnan superecon de la angla li traktis, rakontante siajn spertojn dum trisemajna vojaĝo en foraj regionoj de Sud-Ameriko, kie li aŭdis eĉ ne unu vorton de la supozita mondlingvo.

Multe vigligis la ĉeestantojn demonstrado de la ĥaosaj verbformaj neregulecoj de la

franca kaj la germana kompare kun la kontentiga simpleco de Esperanto. Egale ensorĉa estis lia klarigo de la afiksosistemo. Evidentiĝis la plezuro, kiam la grupo ekkaptis la signifon de tiaj ekzemploj kiaj ‘ĉefinstruistino/lernejestrino’ kaj ‘malsanulejo’ i.a.

Sed eble pli grava estis lia prezento de vivo kiel esperantisto. Li rakontis pri la eblecoj amikiĝi kun alilandanoj, gastis senpage eksterlande kaj interŝanĝi leterojn kun tiuj, kiuj senpere de Esperanto ne povus kompreni. Li rakontis pri la riĉa abundo de Esperanta literaturo, aparte pri la ebleco legi verkojn de alikulturanoj kaj originale esperantlingvaj, kaj ne sole tradukitajn en la anglan. Mirigis la ĉeestantojn rakontoj pri Universalaj Kongresoj, ĉe kiuj regas nur unu lingvo.

Ĉiu forprenis ekzempleron de la unua leciono de la senpaga kurso. Ni atendas nur la rezulton!

Jan Swynnoe



Derek Fielding ensorĉas la membrinojn de Probus

Prepare al la Universala Kongreso en Vilno - kaj la agado de Litova Esperanto-Asocio

En la tuta historio de la Esperanto-movado, eble neniam Universala Kongreso estis tiel ekzemplodone planita ol tiu okazonta ĉi-somere en Vilno, Litovio. La organizanto estas Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio (LEA), kunlabore kun tre valora skipo.

LEA ĉiun semajnfino sendas tra <esper-inform-subscribe@yahoogroups.com> <mailto:esper-inform-subscribe@yahoogroups.com> plurajn komunikojn, kiuj atestas pri bone planita organizado ankaŭ rilate al la ekstera informado. Jam pluraj libroj aperis, i.a. la litova traduko de *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins kaj bona lernolibro por infanoj ok-jaraj kaj malpli.

Laŭ informo de LEA, la 15-an de marto Povilas Jegorovas kaj la direktoro de renoma Instituto pri Eldonado de Sciencaj kaj Enciklopediaj Libroj, Rimantas Kareckas, subskribis kontrakton pri eldono de tri novaj libroj. Temas pri libro de Robert Phillipson *Ĉu nur-angla Europo?* (traduko el la angla), la libro de Rene Centassi kaj Henri Masson *Homo, kiu defiis Babelon* (traduko el la franca) kaj originale en la litova lingvo libro verkita de direktoro de Vilna Teknika Kolegio, estrarano de Litova Esperanto-Asocio, Algimantas Piliponis: *Sociaj lingvaj aspektoj de merkato de nuntempa lingva komunikado*. La unuaj du libroj

aperos en po 1 000 ekzempleroj, la tria en 500 ekzempleroj. Tio estas jam la dua kontrakto inter Litova Esperanto-Asocio kaj la instituto. Laŭ la unua kontrakto estis antaŭvidite eldoni sep librojn, el kiuj ses jam aperis.

Notindas, ke *L'homme qui a défié Babel* estas jam tradukita, krom en Esperanton ankaŭ en la hispanan kaj korean.

La eldonejo Ryto Varpas en Kauno ĵus aperigis libron en du lingvoj (la litova kaj Esperanto)

de Antanas Poska (1903–92) *Requiem*. La aŭtoro estas unu el la plej famaj litovaj esperantistoj, vojaĝanto, sciencisto, ĵurnalisto, homo de legenda sorto. Ĉi tiu libro naskiĝis, kiam la aŭtoro estis en ekzilo. Temas pri pripensadoj pri la senco de la homa vivo kaj kredo pri pli bona estonteco. Ĝin tradukis en Esperanton Vida Beinortiene.

Ĉiuj ĉi libroj estas aŭ estos akireblaj ĉe Litova Esperanto-Asocio kaj ĉe Libroservo de UEA. Litova Esperanto-Asocio, P.k. 167, LT-44291 Kaunas, Litovio. Tel. +370 37 208503, fakso +370 37 228616; rete: litova.ea@mail.lt; ttt-paĝaro: www.esperanto.lt.

AFRIKO

AFRICA

Helpi novan internacian bibliotekon en Afriko

EAB antaŭ nelonge ricevis la sekvan leteron el Kongo:

Karaj Prezidanto kaj Samideanoj,
Ni ĝojas skribi al vi hodiaŭ por peti vian intervenon.

Fakte, de la lasta jaro stariĝis en Kinŝaso 'Kongolanda, Kultura Esperanto-Centro' (KKEC); ene de ĝi funkcias trilingva Biblioteko Zamenhof (Esperanto, franca, angla). Ni jam anoncis pri tiu monumenta projekto, kia neniam antaŭe estis iniciatita en Afriko; kaj ĝi plaĉas al multaj Esperanto-gravuloj en la mondo. Tamen, la malfacilaĵoj kuŝas en manko de materialoj (libroj en cititaj lingvoj, komputilo ktp) kaj manko de mono por ekipi la lokalojn.

Do, nun ni opinias, ke niaj samideanoj el Britio povas aliĝi al ni, triamondanoj, kaj iel helpi subtenante kaj donacante. Se vi bezonas detalojn pri niaj bezonoj, ne hezitu peti informojn.

Samideane kaj altestime,
Emile Malanda Nianga,
Prezidanto de la Landa Esperanto-Asocio (DKEA). Adreso: DKEA, B.P. 761 Kinshasa XI, D.R. Kongo.
Tel. +243 816859158; rete: <prezidanto_dkea@yahoo.fr>.

Konsilas Hans Bakker, kiu jam multajn jarojn prizorgas la disvastigon de Esperanto en Afriko:

La Kongolanda Kultura Centro certe estas apoginda. Unu maniero, per kiu apogi ĝin, estas prezenti al Unesko kadre de unu el ĝiaj programoj. Kvankam ni ne havas multan esperon pri la rezulto, ni tamen volas lanĉi provon, kiam alvenas la prezentdato (fino de 2005).

Sed multe pli certa estas la apogo de esperantistoj. Kutime la helpemo estas inverse proporcia al la riĉeco. Tio validas por personoj kaj por organizaĵoj.

Do, anticipan dankon al malriĉa EAB kompare al Unesko.

Salutas,
Hans Bakker

En sia venonta estrarkunveno la Administra Komitato de EAB diskutos ĉu kaj kiel donaci, sed ni invitas unuopajn esperantistojn kaj grupojn donaci laŭ propra deziro. Librojn ks. oni sendu per registrita poŝto. □

• Thanks!

EAB acknowledges with thanks the receipt of an anonymous donation of £500 to the Education Support Fund, and a Gift Aid Declaration has been signed, so the Income Tax will also be reclaimed.

Jalta rekomendita

Mi plusendas retmesaĝon de Volodimir Hordijenko pri la evento venontjare. Mi revenis pasintsemajne de 'Aroma Jalta 2005', kiun mi enorme multe ĝuis.

Partoprenantoj el dek unu landoj, ĉefe el Europaj landoj, sed ankaŭ de Kanado. La eventon mi elkore rekomendas kiel tre interesa kaj ĝuinda. La klimato similas al la tiu de la franca Riviero – palmoj, strandoj, mirindaj ĉirkaŭaĵoj ks.

Mi pretas respondi al demandoj de iu, kiu deziras partopreni. Vi vidos, ke Ana Montesinos gastparolos, same kiel ĉi-jare!

Mi eble ne partoprenos venontjare tamen pro tio, ke mi planas viziti familianojn.

Elkore salutas, Ian Mac Dowall

40 Danehurst Road, Wallasey CH45 3JJ; rete: MacDowallIan@aol.com

• La 18-a lingva Esperanto-festivalo 'Aroma Jalto' 29 aprilo–9 majo 2006

Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestiĝan kuraclokon de Ukrainio, krimean urbon – Jaltan. Belega ekzotika naturo, altaj montoj, senlima Nigra Maro, florantaj kreskaĵoj, historiaj kaj naturaj vidindaĵoj inspiras vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Krimeo ĉiam allogis multajn homojn, kiuj strebas alten. Famaj verkistoj, poetoj, pentristoj vizitis tiun ĉarman bordon de la duoninsulo por krei siajn ĉefverkojn. Venu kaj komprenu, kial Krimeo estas vizitenda almenaŭ unufoje en la vivo, des pli en la gastama kaj amika Esperanto-etoso.

Programo

Seminarioj por Esperanto-instruantoj; diversgradaj lingvaj kursoj; universitato; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; ludoj kaj pli.



Loĝado: en 2-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, kontraŭ 7 eŭroj; en 3-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, kontraŭ 6 eŭroj; en 4-litaj ĉambroj kun lavabo kaj necesejo, kontraŭ 5 eŭroj; en 5-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, kontraŭ 3 eŭroj. Loĝado ne estas ebla sen nutrado. Manĝado en la bazejo estas 3-foja, kontraŭ 5 eŭroj.

Lingva ordo: Tradicie severa!



Bildoj de Jalto, Krimeo, ĉe Nigra Maro

'Nulajn komencantojn' oni ne akceptas. Dum la registrado ĉiu partoprenanto memstare plenigas la aliĝilon kaj respondas simplajn demandojn.

Kontribuantoj al la programo ricevos rabaton.

Pliaj informoj haveblas de: Volodimir Hordijenko, P.k. 35, UA-01133 Kijiv-133, Ukrainio. Tel. (044) 285 17 01; *rete:* volodimir_h@yahoo.com; *ttt-paĝaro:* www.aromajalta.by.ru.

New Members

B. Adams, Dunmow
Mrs M. McIlvenny, Belfast
R. De Neuville, Guildford
J. Williamson, Glasgow

New Supporters

Frank Curtis, Cheltenham
Paul Reed, Chester
Jaques Wilfrid, London

Passed the Intermediate Examination

Mark Drake (with Distinction)
Brian Shaw (with Distinction)

Passed the Elementary Examination

Joan Singleton, Ormskirk

Completed the Free Postal Course

Doris Busenkell, London
Eleanor Gibb, York

Deceased

Warren Greatrex, Cambridge
Olive Henley, Bury St Edmunds
G. Swale, Sowerby Bridge

Raporto pri la Semajnfino

De la 13-a ĝis la 15 de majo, en belega vetero, dek sep samideanoj sincelis al Barlastono pro la ĉiujara semajnfino kaj jarkunveno de SATEB.

Prezidanto Bill Simcock bonvenigis la gastpreleganton Atilio Rojas el Argentino. Li estas spertulo pri klasikaj lingvoj, la rusa lingvo kaj kompreneble Esperanto, ĝia historio kaj instruado. Li tenis postenojn interalie en ILEI, UEA kaj TEJO.

Atilio kortuŝe parolis pri la malbonsorto de amerikaj indiĝenoj. Kutime ili suferis kaj suferas ekspluatadon, genocidon kaj fine forgeson, ĉu la enmigrintoj venkis per milito ĉu per komerco. Sekvis vigla diskuto.

Posttagmeze oni diskutis politikajn aferojn, kaj ĉu aŭ ne esperantistoj rajtas diskuti partipolitikon en siaj kunvenoj.

Dum la SAT-kunveno grupeto foriris por simpla konversado, kaj poste oni kune sidis por elekti novajn oficulojn, kaj longe diskuti pri kiel allogi novajn SATEBanojn.

La 'Distra Vespero' malkaŝis novajn kaj velkantajn stelojn, kiuj kantis, ludis pianon, legis, ŝerce aŭ rememorige rakontis.

Dimanĉe, post diskuta sesio oni fikse ridetaĉis por la fotiloj dum la insektoj mordis kaj poste dankeme eskapis en la domon por denove aŭskulti prelegon de Atilio pri 'Agado Espero', almoza fondaĵo, kiu konstruas lernejojn por infanaj viktimoj de naturaj katastrofoj en tri regionoj de Afriko, kondiĉe, ke la lernejo ankaŭ instruas Esperanton. Ĝenerala diskuto sekvis.

Ĉiuj ĝuis tradicion dimanĉan tagmanĝon, formale dankis la stabanojn pro ilia kutima altnivela zorgo, kaj, reviglitaj, galopis denove al la klasĉambro por la Socia Politika Forumo kaj la Lingva Kliniko.

Rigardu la kolegian jarplanon kaj venu kun ni en la gaja monato majo 2006!

AK

Language Watch

My esteemed colleagues think this could be a useful project. We're calling it 'Language Watch'. The idea is to keep a record of references in the media and publications (books etc.) not just to Esperanto but also to examples of 'English linguistic imperialism' and the fate/future of 'minority languages'. I'd welcome references you may see or hear as above (date, reference, author and a one-or-two-line summary/quote) sent to me by e-mail – derektatton@btinternet.com – or via the EAB Office, and I'll record them in a file to hand over to the Butler Library, Esperanto House. The record may also shortly be available on the EAB website for reference. This is an experiment so if it doesn't work, we'll stop.

The references may be to everything from, for example, a jokey slighting reference to Esperanto on *Bremner, Bird and Fortune* (Channel 4, Sunday, 13 March '05) to the book just published *Empires of the World - A Language History of the Word* by Nicholas Ostler (HarperCollins, 2005). Although Esperanto is only mentioned once, on page 171, of this 600-page book. The author's themes and arguments are deeply relevant to Esperanto and, I believe, positive and encouraging. Martin Jaques reviewing what he calls 'this great book' for the *Guardian* (12 March '05) on the 'Book of the Week' page wrote: 'But which languages, a millennium from now, will still be prospering, which will be the dominant global languages, and which will be the lingua franca? From our vantage point in the early 21st century, this remains entirely unpredictable.'

In David Crystal's earlier authoritative book *Language Death* (CUP, 2000) he wrote that if in future English were the only language to survive that would be 'the greatest intellectual disaster the world has ever known'.

Interesting? If you agree, I look forward to hearing from you anytime. However, don't necessarily expect me to engage in correspondence, still less argument about the merits of this or that. My role at this stage is simply to record. Thanks in anticipation.

Derek Tatton

Skota Studrondo

Temo: 2005 – La Jaro de Einstein

La skota Studrondo okazos la 3-an kaj 4-an de septembro 2005 en Scottish Churches House, Dunblane, proksime al Stirling. La pitoreska urbeto estas facile atingebla per trajno kaj buso.

La temo ĉi-jara estos Albert Einstein. Antaŭ cent jaroj en 1905 Einstein ŝokis la sciencan mondon per publikigo de sia Teorio de Relativeco. Einstein komencis revolucion en scienco, kiu ŝanĝis nian komprenon pri la mondo. Fizikistoj tutmonde celebras ĉi-jare 'La Jaron de Einstein', kaj nia studrondo respegulos tion. Ni esploros la vivon kaj tempojn de Einstein kaj demandos ĉu lia kontribuo daŭre validas. La studrondo estos ne nur science seka, sed ankaŭ amuza kaj luda.

La prezo estas £55, kiu inkluzivas tranoktadon je sabata vespero kaj ĉiujn manĝojn en Scottish Churches House, aŭtobuson por la ekskurso kaj ekskursan gvidadon. Ni ekskursos al 'L'Ananaso' en Dunmore kaj al Kastelo Airth, kie ni lunĉos en la tiea hotelo (vidu ambaŭ ĉe www.rampantscotland.com/visit/blvisitdunmore).

La lunĉo, kiu konsistas el ĉefplado kun teo aŭ kafo kun kukoj, kostos £8,50 kaj pagendos en la hotelo.

Se vi havas demandojn, bonvolu kontakti: Hju Rid (Hugh Reid) ĉe 01357 523949 aŭ hugh_reid2@yahoo.co.uk.

La fina dato por mendi estas la 12-a de aŭgusto.

• **‘Language terrorism’**

On 1 June there appeared a short article in *The Guardian* by Luke Meddings under the title of ‘Decline of the English empire?’ It dealt with what he calls the ‘language terrorism’ employed by English-speakers in the European Song Contest television broadcast. We may reprint the article in the next issue of *EAB Update*.

• **Humanisma konferenco akceptas Esperanton**

De la 1-a ĝis la 2-a de majo en Peterburgo okazis la 9-a konferenco de la Internacia Koalicio ‘Por la Humanismo’.

Enkadre de la programo Oksana Burkina elpaŝis kun la prelego ‘Humanismaj tendencoj en la moderna socio. Lingvistika aspekto’.

La plej grava rezulto de la prelego estis unu el oficialaj decidoj de la konferenco: ‘Akcepti Esperanton kiel la lingvon por internacia komunikado de la Koalicio. Establi kontaktojn kun humanistoj-esperantistoj’.

Trovi informojn pri la konferenco kaj ties decidoj vi povas ĉe: http://forhumanism.org/?target=ru/conf2005_about.

Oksana Burkina estas Peterburga esperantistino. Ŝi studas en postdiploma fakto de la

Peterburga Ŝtata Universitato kaj verkas disertaĵon pri moderna fonologio de Esperanto. (Publikigita ĉe www.peterburgo.info.)

• **Instruistoj de Esperanto serĉataj por suda Barato**

Kiu kuraĝulo havas la eblecon kaj pretas proprakoste veturi al Bangaloro, Suda Barato (Hindio) por instrui Esperanton al lernantoj en lokaj lernejoj? Kono de la angla, eĉ se elementa, estos avantaĝo. Vi devos pagi viajn vojaĝkostojn, sed oni surloke gastigos vin. Vi rajtos resti tiel longe kiel vi deziras, sed almenaŭ du-tri monatojn. Se vi estas tiu kuraĝulo, bonvolu skribi samtempe al la retadreso: <evoluo@esperanto.org> kaj al Venkatesh Reddy ĉe <esperovr@yahoo.co.in> por interkonsenti pri la afero. Adreso por papera korespondado: S-ro A.S. Venkatesh Reddy, No 216, Espero, Off Main Road, Whitefield, Bangalore-66, Karantaka, Barato. (La afero venas de la Prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti.)

• **Jubilea skolta ĵamboreo**

En aŭgusto 2007 okazos la 100-a Tutmonda Skolta Ĵamboreo en Gillwell, Essex. EAB esploras la plej taŭgan tiurilatan informagadon, kaj petas, ke tiuj, kiuj pretas iel ajn volontuli, bonvolu kontakti la estraraninon pri informado: Helen Fantom. Tel. 01635 38592; rete: helen@fantom.org.uk, aŭ skribe pere de la oficejo de EAB.

• **Esperanta Diservo Londona**

Post preskaŭ 93 jaroj, la kristana rondo, kiu okazigas la ĉi-monatajn Diservojn en Esperanto en Londono, decidis pro diversaj kialoj ripozigi la aranĝon ekde julio. La Diservojn fondis en oktobro 1912 Montague Butler, kies himnaron oni ankoraŭ uzas.

• **Nova malferma ttt-ejo**

www.EsperantoUniverse.com estas nova ttt-ejo ‘ne tute ordinara’, ĉar ĝi estas ‘malfermita projekto’, kio signifas, ke ĉiu povas partopreni en la komuna retejo, fari aldonojn kaj gvidi interesajn por vi rubrikojn

kaj temojn. Oni atendas, ke multaj esperantistoj el diversaj landoj ekdeziros aktive kunlabori, komunikiĝi, praktike efektivigi ideojn. (Raportis S. Vajnblat.)

• **Nova telugu-lingva lernolibro**

Ĝus aperis la unua lernolibro de Esperanto en la telugua lingvo: *Esperanto, la internacia lingvo*. Ĝin verkis G.K. Vijaya Kumar kaj eldonis Federacio Esperanto de Barato (Hindio). La telugua estas dravida lingvo parolata de pli ol 40 milionoj da homoj en la sudorienta barata ŝtato de Andrapradeŝo. En Eŭropo la libro kostos proksimume 4 eŭrojn. EAB eventuale faros kampanjeton inter teluguparolantoj en Britio.

• **Quakers use Esperanto**

In June a gathering of Quakers from central and eastern Europe (Austria, Belorussia, Croatian, Czech Republic, Hungary, Poland, Romania, Serbia, Slovakia, Ukraine, plus a few from England) took place in Budapest. The working languages were English, Esperanto, Hungarian and Russian.


• A piece, initiated by Eric Walker, appeared in the 27 May issue of *The Friend* under the title ‘Esperanto lives on’. It mentioned both the Quaker Esperanto Society and printed Eric’s e-mail address for further information.

• **Konkurso por grafikistoj**

Ĉar la urbo Kronach festos en la jaro 2006 la 200-an datrevenon de la naskiĝtago de la lingvosciencisto Johann Kaspar Zeuss, oni proponas kalendarprojekton por grafikistoj. Oni aparte bonvenigos kontribuojn el la keltaj regionoj de Eŭropo. Detaloj haveblas de s-ro Armin Grötzner, Giessübel 36, D-96317 Kronach, Germanio. Tel. (0) 92 61 - 16 21 aŭ (0) 92 61 - 96 38 51.

• **Informoj pri la Universala Kongreso en Florenco**

La unua versio de la ttt-paĝaro



La kovrilo de la nova telugu-lingva lernolibro de Esperanto

Foto: Assessorato al Turismo di Firenze

www.ukflorenco2006.it de la Universala Kongreso en Florenco en 2006 jam funkcias. Pliaj informoj pri la UK troviĝas ĉe: www.ukflorenco2006.it; rete: uk2006.informoj@esperanto.it. La foto montras la koridoron Vasariano de la fenestro el Galerio Uffizi

• Centjara datreveno en Nederlando

Antaŭ cent jaroj fondiĝis Holanda Societo Esperantista, LEEN (La Estonteco Estas Nia). Ĝi estis la praasocio de la nuna Esperanto Nederland, kiu kunfandiĝis antaŭ dek jaroj kun FLE (la laborista organizaĵo). La oficiala fondodato estis la 27-a de aŭgusto 1905. Estas malfacile organizi ion je la 27-a de aŭgusto pro la feria periodo.

Okazis jam pluraj eventoj. Oni presigis novan informmaterialon. Plue oni ornamis la jam ekzistantajn aranĝojn pli feste ol kutime: la studsemajnfino, la jarkunvenon kun Esperanto-torto. La urbo Alkmaar (Nord-Holando) havas kontaktojn kun tri ĝemelaj urboj: Darmstadt (Germanio), Tata (Hungario), Troyes (Francio). La esperantistoj el la provinco Nord-Holando organizis kvin-tagan restadon de la esperantistoj el tiuj ĝemelurboj, kun kiuj ili havas bonajn kontaktojn. Esperanto Nederland respondicis pri la sabata kaj dimanĉa aranĝo. Oni



La jubilea marko de la nederlanda Esperanto-asocio, kiu legiĝas '100 jaroj interparole kun la mondo'

Literatura konkurso *Liro* 2005

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn partopreni en la tradicia literatura konkurso Liro.

Liro 2005 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: *V lesu rodilasj joloĉka* de Raisa Kudaŝova. (Kiel kanto de Leonid Bekman, ĝi 100-jariĝas ĉi-jare.)
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: *Krasnyj cvetok* de Vsevolodŝin.
5. Traduka prozo el la angla lingvo: *Journalism in Tennessee* de Mark Twain.

En ĉiu originala branĉo oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro, s-ino Halina Gorecka, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ 15 oktobro 2005.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe <http://Esperanto.Org/Ondo/Ind-liro.htm>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2005. La organizantoj ĝis 1 januaro 2008 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage en okazo de eldono de antologio de Liro.

Sukcesojn al vi!

kunvenis kaj festmanĝis apud la maro en Egmond aan Zee. La komunumestro oficiale malfermis la aranĝon. Krome, oficiale alparolis reprezentanto de Litovio. La ambasadoro promesis ĉeesti, sed li devis rezigni lastmomente pro oficialaj kaŭzoj. Sabaton vesperon prezentis la kantgrupo Kajto. La evento tiris la atenton de la provincaj televido, radio kaj ĵurnalo.

Oni dissendos ĝeneralan komunikon al la presagentejoj pro la 27-a de aŭgusto.

• Esperanto-libraro de Universitato de Amsterdamo alirebla

La biblioteko de Universitato de Amsterdamo posedas kolekton de libroj kaj gazetoj en kaj pri Esperanto, kiu nombras pli ol

3.000 titolojn. Parton de tiu stoko konsistigas la libraro de la landa asocio 'Esperanto Nederland', kiun la universitato mastrumas por ĝi. Post longa laboro, la tuta kolekto estas nun katalogita, kaj rete konsultebla. La adreso de la libere alirebla katalogo estas: <http://opc.uva.nl>. De la bonveniga paĝo vi povas elekti inter nederlandlingva kaj anglalingva daŭrigoj. Alklaku la supran ligon 'Catalogus van de Universiteit van Amsterdam' aŭ 'Catalogue of the Universiteit van Amsterdam' por atingi la elirpaĝon por viaj katalogaj esploroj. En la serĉlinio 'zoeken' aŭ 'search' tajpu la du mallongigojn 'tac esp' (sen citiloj, sed kun unu interspaco) kaj konfirmu (tac esp signifas 'taalcode Esperanto', t.e. 'lingvokodo Esperanto'). Responde

vi devus ricevi la komunikon pri 3104 trafoj, kiu estas la Esperanto-kolekto, ekrane trairebla en sia tuta amplekso. Anstataŭ tajpi 'tac esp' vi povas uzi la indikitajn serĉkriteriojn, kaj tuj serĉi laŭ titolo, aŭtoro ktp. De ĉiu trovita titolo vi trovos la aŭtoro(j)n, eldoniston, eldonjaron, bindmanieron, eventualan serian apartenan, referencnumeron, fizikan situon de la volumo kaj informojn pri la prunteblo kaj disponeblo. (Informis Wim Jansen, Docento pri Interlingvistiko kaj Esperanto de Universitato de Amsterdamo.)

• Silver Cup to East London Esperanto Group

On 19 March, Joyce Bunting presented Norah Brown with the Silver Cup for the Eastern Esperanto Federation's intergroup competition – for the second time. Congratulations!

• Amateur radio

On the occasion of the 80th anniversary of the International Amateur Radio Union, Mike Wade (M0EDU) has written articles 'Getting Communication History into a Modern Perspective' and 'Advancing Science Education in the New Millennium' with 'Suggested Projects for Discussion', in which he advocates the use of Esperanto.

• Radio interviews

An interview with Radio Lancashire was broadcast on Saturday morning, 21 June, the day of the Esperanto Federation meeting in Preston. It was triggered by Jim Voiel's press release, sent out to 13 local media outlets to promote the North West Esperanto Federation meeting on the same day.

The second interview was with Radio Cumbria and was recorded on Wednesday morning, 25 June, and broadcast soon afterwards without any editing. The trigger for this one was Stephen Thompson's contact with the lunch-time programme on local radio, to which he regularly contributes on a variety of topics. The presenter, Martin

Plenderleith, always mentions 'Esperanto-speaker' when introducing him, whatever the topic, and last time he was 'on' he suggested they might do something the next time he had an Esperanto-speaking visitor. In fact, the presenter more or less challenged Stephen to prove that Esperanto works and is in use.

Marek Bamperski from Poland attended the Federation meeting as he had done the previous year. The focus of the interview was largely on the Pasporta Servo – a most practical selling-point. (Information received with thanks from Stephen Thompson.)

• Nova dana hejmpaĝo pri Hans Christian Andersen

La nova ttt-nejmpaĝo www.chifonoj.dk enhavas artikolojn pri la fama dana fabelisto Hans Christian Andersen kaj tradukojn de liaj fabeloj okaze de lia 200-jara datreveno de lia naskiĝo la 2-an de aprilo 2005. Multaj el la fabeloj de Andersen estas tradukitaj en Esperanton. Zamenhof tradukis multajn. Oni tamen ne montras ĉi tiujn fabelojn en la hejmpaĝo, ĉar ili estas en aliaj hejmpaĝoj, sed oni montras fabelojn, tradukitajn de aliaj personoj, precipe danoj, kaj novajn tradukojn de fabeloj, kiuj

neniam antaŭe estis tradukitaj, kelkajn eĉ en pluraj versioj. Bonan plezuron per la studado kaj legado! (Lars Kromann, Stenbrydervej 6, DK 4640 Fakse, Danlando; rete: hca-esperanto-get2net.dk.)

• Gift Aid

A member asked at the AGM what percentage of members give by Gift Aid. The answer is 143 people out of a membership of 413 full members, which equals 35%. This does not include 'Supporters'. The total tax rebate recovered was £1,183.40 in April 2005.

• Ludi briĝon?

La 29-a FISAIC-Briĝturniro okazos en Galati, Rumanio (13–17 junio 2006). Ŝajnas, ke ankoraŭ ne estas Esperanta sekcio, sed kial ne komenci tian? Regionala CF Galati, Clubul de Bridge al Feroviarilor, Str. Domneasca 51, RO-80008 Galati, Rumanio. Rete: goviro2003@yahoo.com.

• Jarlibro de UEA

Ĵus aperis la Jarlibro de UEA. Rigardu paĝon 127, kie aperas reklamo de EAB pri plej lastaj eldonaĵoj kaj informoj pri la Somera Festivalo de EAB en Barlastono. □

LETERE KAJ RETE

Dankon pro Bulonjo!

Gekaraj,

Iomete malfrue (pro profesia laboro), mi dankas vin ĉiujn pro la neordinara kunlaboro por 'Bulonjo 2005'. Estis ege agrabla etoso, kiun ni longtempe rememoros.

Amike via,

Flory Witdoeck, Belgio

☐ ✍ ☒

Sudaj problemoj

Kara redaktoro,

Kiam ni ricevas gazetojn kaj flugfoliojn, ĉu ni vere uzas ilin? La rolo de esperantisto ne estas

LETTERS AND E-MAILS

nur ricevi eldonaĵojn kaj perfektigi la lingvouzon.

Pro la malforteco de la suda federacio, ĉu ni povus sugesti trans la Markolo, ke ili akceptu nin kiel anojn de grupo en Norda Francio?

Kaj post la subita morto de Petro Miles, ne plu funkcias la tradukservo.

Sincere,

Annice Szrajbman

☐ ✍ ☒

Historical picture

Dear Editor,

Following the AGM on May 7, in which EAB members elected

Spring Meeting of the North West Esperanto Federation

The Spring Meeting took place on 21 May in Preston, at the Empire Services Club, an attractive green location in the city centre.

Twenty-two participants met, from various towns across Northern England and the Isle of Man. We also welcomed an old friend from Poland, Marek Bamberski. Visiting for the first time were Simon Arm-Riding and Donnachadh Mag Loingsigh, both from Yorkshire.

Our guest speaker was Dr Derek Tatton, a member of

EAB's Management Committee, who spoke on 'Adventures in English, adventures in Esperanto; how much I have learnt from experiences in English'. Derek presented an interesting history of the English language from the time of Chaucer to the present, also answering questions later.

Long discussions followed, and there was not time for the traditional conversational groups. The success of this event indicates that the Esperanto movement is growing in strength in our region. Many thanks to the other organisers, Jim and Gaynor Voiels, for their hard work in the preceding weeks.

Below: *the Bournemouth group at the celebratory meal for Zamenhof Day / EAB Centenary last December, Trevor Simpson presided.*



me to the Management Committee, I was given a remit of 'Research'. Precisely what the scope of the research will be, we will discuss at our July weekend residential meeting in Barlaston.

In the meantime, I personally am interested in following up points expressed at the AGM with respect to membership figures, with a view to building up a historical picture of how we got where we are, and then how we might proceed in the future. If any of your readers – whether or not they are themselves members – wish to express views on this, or, indeed, if they have any relevant information, then I should very much wish to extend to them an opportunity

to share it with me.

In particular, I would like to be able to make contact again with Brian Barker, who used to run the lobbying activities for Esperanto in the UK, and was the contact person for Members of Parliament in Westminster. I can understand that he may not wish at this stage to come back into the Esperanto movement, but I would indeed welcome a debriefing session with him. Can anyone put me in touch, please?

My contact details are: Ian Fantom, 92 Enborne Road, Newbury, Berkshire, RG14 6AN. Tel. 01635 38592 Fax: 01635 841675 E-mail: ian@fantom.org.uk.

Many thanks,
Ian Fantom

Nekrologoj

Forpasis en Kembrigo la 22an de aprilo 2005 **Warren**

Greatrex, 85-jaraĝa, membro de EAB dum pli ol dek jaroj. Kvankam li nur iomete studis la lingvon, li tamen aliĝis al EAB pro sia profunda kredo je la graveco kaj taŭgeco de Esperanto.

Geoffrey Greatrex (lia filo)

Herbert Lionel Elvin (1905–2005), Principal of Ruskin College, Oxford (1944–50), and Director of the Institute of Education, London University, died in Cambridge on 14 June at the age of 99. He was an eminent professor of education, Director of the Department of Education for Unesco (Paris, 1950–6), Professor of Education in Tropical Areas, Institute of Education, London University (1956–8), Director (1958–73), Emeritus Professor of Education 1973–2005. He was an Esperantist and a member of the Honora Patrona Komitato de UEA.

Elvin was active in numerous causes, for example, the Workers' Educational Association, the Council for Education in World Citizenship and as chairman of the Commonwealth Education Liaison Committee. His English-language publications include *Men of America* (1941), *An Introduction to the Study of Literature* (Poetry) (1949), *Education and Contemporary Society* (1965), and *The Place of Commonsense in Educational Thought* (1977).

Elvin translated Washington Irving's *The Sketch Book of Geoffrey Crayon* into Esperanto as *El la Skizlibro* (Leipzig: Hirt, 1924).

Korespondi deziras

Tomasz Źarski (38-jara), ul. Zakopiańska 48, PL-54-031 Warszawa, Pollando. Li interesiĝas pri turismo, folkloroj, libroj, valoraj filmoj kaj biciklado.

New and standard items

The full catalogue can be viewed on the recently rebranded website – www.esperanto-gb.org – or you can request an A5 copy by sending a SAE (address p.2). All prices below incl. p.&p.

DVDs

- ◆ **Baltmara sukceso** *About amber – a natural product from this area of outstanding beauty* £6.10
- ◆ **Flying an Octopus** *A documentary on the world's first piloted latex balloon sculpture. Choose from commentary in English and Esperanto, subtitle choice from English, Spanish, Esperanto, Portuguese. Ideal for showing to non-Esperanto-speakers* £24.50



- ◆ **Kaunas, urbo de kunfluo** *An agreeable walk through the second-largest city in Lithuania, to see the sights.* £6.10
- ◆ **Litova kalendaro** *A trip through the four seasons to show the customs, traditions and rituals in a Lithuanian village.* £6.10

Books NEW!

- ◆ **Tinĉjo en Tibeto.** *Full-colour comic-strip style. Tintin and his dog Milu travel to Tibet for new adventures.* Paris. £11.21
- ◆ **50 fabloj de Ezopo** *A collection of Aesop's fables.* Japan, 2004. £4.83
- ◆ **Leteroj de Paŭlo kaj lia skolo** Trad. G. Berveling *First volume of the New Testament in a new Esperanto translation.* 2004; 253p. £15.99
- ◆ **Traduku!** William Auld *This new publication brings together 56 translation tasks that originally appeared in The British Esperantist. The first section presents the tasks, the second section the extensive comments and the model translation. An index of relevant words and discussion points is included at the back. An excellent book to hone translation skills* £8.05
- ◆ **Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005** *The illustrated 'standard' international Esperanto dictionary known as 'PIV', with definitions in Esperanto – a must for all serious speakers.* Paris: SAT. £60.00 (includes postal insurance).
- ◆ **The Hidden Perverse Effects of the Current System of International Communication** Claude Piron (Rotterdam: UEA. *Esperanto documents 48a*). *Booklet describing the work, organisation, culture and history of the movement for the adoption of the international language.* £2.19

NOW IN STOCK AGAIN

- ◆ **Plena vortaro de Esperanto kun suplemento** *The 'handy' shorter version of PIV.* Paris: SAT, 1996 £17.83
- ◆ **La danĝera lingvo** Ulrich Lins *Documented history about the attacks against the Esperanto movement, particularly under Hitler and Stalin but also in Tsarist Russia, Eastern Asia and in the League of Nations.* £16.91
- ◆ **Sankta Biblio.** *New expanded Esperanto version of the Bible. The Old Testament as translated by L.L. Zamenhof plus New Testament and Apocrypha.* British and Foreign Bible Society. 2003. 925+225p. £15.53
- ◆ **Esperantaj sinonimoj** Jaan Ojalo *Increase your word power. 5,500 listed words to help enrich your everyday written and spoken Esperanto. 3rd corrected edition.* 1999. £5.75
- ◆ **Esperanto: lingvo, literaturo, movado** Pierre Janton *An overview of the usage and development of Esperanto.* £9.20
- ◆ **Esperanto: Language, Literature, and Community** Pierre Janton *General introduction to Esperanto and its role in the modern world.* £10.93

Audio CDs

- ◆ **Mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj el Ĉinio** *Texts pertaining to about 30 of China's wonders. Produced by Ĉina Radio Internacia.* £7.94
- ◆ **Jen nia mondo** *Popular radio course from the 1970s. 'Absorb' Esperanto – in the car, around the house or on your way to work! Everyday situations are presented in the form of dialogue with grammatical explanations in English.* Jen Nia Mondo 1 (3 CDs) £13.80, Jen Nia Mondo 2 (3 CDs) £13.80 – buy both together for £25.30.

Sundries

- ◆ **Postcards – Zamenhof** *by Moscheles in 1907. From the restored portrait in the Butler Library.* 4 for £1.80 (10 for £4.00)
- ◆ **Esperanto Badge** – *New – high-quality enamel, brooch style, 2.5cm oval shape, 'egg' emblem in white, green and gold, ESPERANTO in green letters – a little jewel* £3.33